

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)

Regularo por retaj voĉdonoj

Ĉi tiu regularo estas akceptita de la senkvoruma komitato en Kubo en julio 2010, kun modifo nur de la lasta alineo. La estraro aplikas ĝin por sia interna funkciado. La komitato akceptis la regularon per fizika papera voĉdono en marto 2011. Akcepto de la regularo ĉefe temas pri akcepto de la principo, ke voĉdonoj okazu rete, kaj ne malhelpas postan transiron al pli konvenaj mekanismoj, se tiuj plenumas niajn bezonojn. smg.

----- regulara teksto -----

Motivigoj por reta voĉdonado:

- Tio efikigas la laboron ĉar ĝi permesas decidadon tra la tuta jaro, bazita sur kiel eble plej vasta opinisondado.
- Komitata retvoĉdonado permesas tutmondan partoprenon kaj ne limigas la decidorajton al tiuj landaj sekcioj kies komitatoj aŭ anstataŭantoj povas partopreni konferencojn.
- Obstakloj atingi retkonektojn ege malpli realas ol obstakloj fizike atingi konferencojn aŭ decidokunvenojn.

Proceduro:

1. Proponojn por voĉdonado oni sendas al la sekretario kaj prezidanto, kiuj post konsultiĝo povas iniciati voĉdonon aŭ motivi la kialon ne fari tion. Proponoj pri malfondo de la ligo, ŝanĝoj al la statuto aŭ pri estrarelektoj ne estas voĉdoneblaj rete.
2. Voĉdonadon organizas la sekretario kaj/aŭ la prezidanto per mesaĝo kiu prezentas precize formulitan voĉdonproponon sekvata de detaligo pri la kialoj kaj sekvoj de la voĉdono.
3. Tiu mesaĝo lanĉas la debatan fazon. Por estraraj elektoj tio daŭras 7 tagojn, por komitato 21 tagojn. La mesaĝo povas esti sendita al pli da homoj ol estas voĉdonrajtaj; por ke ili estu informitaj kaj povu kontribui al la debato. Ĉe komitataj voĉdonoj, tipe la sekciestroj ricevos la mesaĝon; ĉe la estraro, observantoj kaj estraraj komisiitoj ĝin ricevos. Oni respektas (r)etiketon kaj la unikan kulturan diversecon de la partoprenantoj. La prezidanto kaj sekretario aŭ ties delegito mastrumas la debatadon.
4. Se la debata fazo kreis proponon modifi la originan proponvortumon, la prezidanto kaj sekretario decidas ĉu tuj pluri kun modifita kaj konsentita teksto aŭ voĉdonigi la modifon aparte antaŭ ol voĉdonigi la (ne)modifitan proponon mem.
5. La sekretario kaj prezidanto tiam lanĉas la veran voĉdonon. Ĉi tiu mesaĝo estas sendita nur al voĉdonrajtigitoj kaj havas la precizan voĉdonotan proponon, eventuale kun aldono de resumo de la rezultoj de la debata fazo. La voĉdona fazo daŭras por estraraj voĉdonoj ĝis maksimume 7 tagoj – ĝis plimulto da unudirektaj voĉoj estas atingitaj. Komitata voĉdono daŭras 14 tagojn, tiel ke ĉiu voĉdonrajtigito havas eblon registri sian voĉon. Voĉdonelektoj estas tipe: JES, NE, SINDETENO. Tiukaze, simpla plimulto da jesaj aŭ neaj voĉoj decidas la demandon.
6. La voĉdona mesaĝo havas temlinion kun la sekva strukturo, por ke ĝi estu kiel eble plej rimarkebla: VDON-E-2010-01 [Temo]. La kvina litero estas "E" por estrara voĉdono kaj "K" por komitata. La lastaj du ciferoj estas serio-numero.
7. Kiu volas voĉdoni publike respondas en la mesaĝ-fadeno, lasante la temlinion senŝanĝa. Kiu volas voĉdoni private faras tion en nova mesaĝo kun la sama temlinio kaj sendas ĝin nur al la prezidanto kaj sekretario.
8. Oni rajtas plue diskuti tra la voĉdona fazo, sed oni faru tion ĉe la diskutiga mesaĝfadeno, ne pere de la voĉdoniga fadeno.
9. Kaze de maleblo atingi retaliron tra la voĉdoniga periodo, rajtigito povas komuniki sian voĉon alimaniere (ekz. letere, SMS-e aŭ telefone)
10. La voĉdonrezultoj estas registritaj loke ĉe la prezidanto kaj sekretario. Ili publikigos la respondintojn - ekzemple tra komitata vikio, por ke voĉdonintoj havu manieron konfirmi la sekuran alvenon de la voĉdono. Fine de la voĉdona periodo la rezulto estas komunikita, kaj aldonita al registro de voĉdonoj en la liga retejo. La unuopaj voĉdonmesaĝoj estas tiam forigitaj el la retejo.
11. Akceptita decido estos efektivigita tuj post la fino de la voĉdona periodo, sed ĉiuj rete traktitaj komitataj voĉdonoj estos reviziitaj de la komitato en ĝia sekva kvoruma fizika kunsido por konfirmi aŭ modifi la decidojn.

----- fino de teksto -----